

Komitatkunsido de TEJO dum la 75-a IJK

Liptovský Hrádok, Slovakujo

29-a ĝis 30-a de julio 2019

Raporto de la Elekta Komisiono



Oficperiodo 2019-2020

Redaktita de la Elekta Komisiono:

- Rogier "Roĉjo" HUURMAN
- Oleksandra "Sasha" KOVYAZINA
- Michael Boris MANDIROLA
- José Querino DE MACÊDO NETO

14-a de julio 2019

Enkonduko

Estimataj komitatanoj,

laŭ la [Reglamento pri Elekto de Estraranoj](#), la Elekta Komisiono serĉas kandidatojn por la nova Estraro kaj akceptas kandidatiĝojn, esploras ĉu kandidato estas taŭga por posteno en la estraro, aŭ eventuale rekomendas ekster-estraran postenon kaj rekomendas al la Komitato kandidatojn al la nova Estraro.

Por serĉi kandidatojn ni aranĝis malferman alvokon, kontaktis persone kaj rete nuntempajn estraranojn kaj potencialajn kandidatojn al la nova Estraro.

Kiam alvenis la 30-a de junio, ankoraŭ mankis kandidatoj por kelkaj gravaj postenoj, tial la Elekta Komisiono remalfermis la kandidatiĝon ĝis la 10-a de julio, kio, kune kun aktiva kaj celita varbado rezultis en multaj aldonaj kandidatiĝoj.

La Komisiono provis organizi kun ĉiu kandidato personan retan intervjuon, ĉefe por taksi la eblan dediĉon al la posteno, la konon de la funkciado de TEJO, kaj la rilatajn spertojn. La fina rezulto estas listo de 13 kandidatoj el 14 landoj, el kiuj eblas formi diversajn teamojn depende de la preferoj de la Komitato.

El 13 kandidatoj:

- 5 estas inoj kaj 8 malinoj;
- La plej juna kandidato aĝas 20 kaj la plej maljuna 33;
- Laŭ devenlando estas 2 kandidatoj el Afriko, 5 el Ameriko, 4 el Azio kaj 2 el Eŭropo;
- Laŭ loĝlando dum la mandato estas 1 kandidato el Afriko, 5 el Ameriko, 4 el Azio kaj 3 el Eŭropo.

La Elekta Komisiono rekomendas ke estu minimume 7 kaj maksimume 9 estraranojn.

Alkroĉite vi trovos la kandidatiĝdosierojn de la kandidatoj.

Kandidatoj

Prezidanto

Por la posteno de prezidanto alvenis unu kandidatiĝo.

Abel Johannes KIEFTE (Joop)

Proponintaj fakoj: Aktivula Trejnado, Landa kaj Faka Agado, Pasporta Servo, Rilatoj kun UEA, Talento, Tehnologio

La Elekta Komisiono rekomendas ke Joop estu elektita kiel prezidanto.

Joop havas longan sperton en TEJO ĉefe kiel komitatano kaj en diversaj aliaj roloj kiel oficisto, estrarano de landa sekcio, TEJO-trejnisto. Dum multaj jaroj li ankaŭ konstruis vastan kontaktoreton kiu estus certe tre utila en gvidado de la organizo.

Kiel kandidato al prezidanteco, li havas kaj ĝeneralan ideon pri kien stiri la organizon sed ankaŭ tre konkretajn ideojn pri pluraj kampoj por disvolvi kaj pliintegri la agadon de TEJO.

Li ankaŭ havas fokuson pri homaj rilatoj kaj aparte pri la interkultura kunteksto kaj tion prizorgi en la organizo; aliflanke li estas konscia pri kelkaj propraj malfortaj punktoj. Tiurilate, ni kredas ke en la teamo estas taŭgaj personecoj por efika kunlaboro kun li, aparte kaze de la vicprezidantoj.

Joop havas signifan sperton en ĉiuj fakoj por kiuj li proponas sin kaj estas la nura subteninda kandidato por Aktivula Trejnado, Talento kaj Teknologio.

Tamen pro la ekzisto de aliaj disponeblaj kandidatoj kaj la amplekseco de lia taskaro, ni rekomendas ke alia homo transprenu la rilatojn kun UEA kaj Pasportan Servon.

Kasisto

Por la posteno de kasisto alvenis unu kandidatiĝo.

BÙI Hải Mừng (Feliĉa)

Proponintaj fakoj: Landa kaj Faka Agado, Rilatoj kun UEA

Feliĉa spertas kiel kasisto de TEJO, havan profesion fonon en financoj kaj estas iu el la du estraranoj kiuj rekandidatiĝas, tial la Elekta Komisiono plene subtenas ŝian reelektiĝon.

Feliĉa decidis rekandidatiĝi ĉar ŝi sentis respondecon pri la bonfarto de financoj de TEJO, kaj ŝi revas, ke estontece troviĝos junuloj kun taŭgaj sperto por plu prizorgi financojn de TEJO.

Ĝenerala Sekretario

Por la posteno de kasisto alvenis du kandidatiĝoj.

Catherine NEILSON (Kejti)

Proponintaj fakoj: Pasporta Servo, Scienco

Kejti estas sekretario de USEJ kaj esprimis tre grandan motiviĝon kaj disponeblon por alfronti la taskaron de Ĝenerala Sekretario en TEJO. La sperto en TEJO malabundas sed ni kredas ke ŝi povus bone plenumi la postenon danke al la subteno de Ĝojo kiel eksa Ĝenerala Sekretario.

TRẦN Thị Hoan (Ĝojo)

Proponintaj fakoj: Edukado, Informado, Landa kaj Faka Agado, Rilatoj kun UEA

Ĝojo estas unu el la du nunaj estraranoj kiuj rekandidatiĝas. Nuna prezidanto, ŝi estis ĝenerala sekretario de TEJO inter aŭgusto 2017 kaj januaro 2018 kaj ŝi kontentige plenumis la postenon. Pro sia nova laborsituacio ŝi repretas dediĉi pli da tempo por la Estraro kaj aparte por la posteno.

Tamen ŝi preferus ke alia persono estu elektita por la posteno de ĝenerala sekretario; tiukaze ŝi pretus, de alia estrara posteno, transdoni sian sperton kaj subtenon al la nova ĝenerala sekretario.

Vicprezidantoj

Du personoj kandidatiĝis kiel vicprezidanto, tamen unu el ili ankaŭ kandidatiĝis por Ĝenerala Sekretario, kiu estus nekombinebla posteno.

La Elekta Komisiono rekomendas elekti du vicprezidantojn, se tio estos ebla post la elekto de Ĝenerala Sekretario, kaj lasi al la Estraro difini la ordon de la vicprezidantoj.

Mounir ABJIOU (Munir' Abĵiu)

Proponintaj fakoj: Eksteraj Rilatoj, Projektoj, Volontuloj

Muniro jam de pluraj jaroj laboras kiel oficisto de TEJO, plejparte pri subvencipetoj, kaj profunde konas ĝian agadon kaj la internan strukturon de la organizo, kio farigus lin certe kapabla subteni la rolon de vicprezidanto.

Pro la komenco de novaj studoj pri EU-Publikaj Aferoj kaj Politiko, li translokiĝos al Eŭropo li ne plu povos esti oficisto de TEJO, tamen li deziras plu dediĉi sian tempon por TEJO.

Muniro substrekas la profundan interligon de eksteraj rilatoj kaj subvenciaj projektoj de TEJO (sen kiuj TEJO ne funkcius) kaj taskas ilin neapartigindaj; tial, konsiderante ankaŭ siajn spertojn kiel oficisto kaj siajn studojn, li proponas sin por la du fakoj kaj havas plenan subtenon de la Elekta Komisiono.

Krome pro lia sperto kiel TEJO-volontulo kaj lia prizorgo TEJO-flanke de la Eŭropa Volontula Servo, la Elekta Komisiono rekomendas ke li respondecu pri la volontuloj. Se li estus elektita, li fariĝus la unua estrarano de TEJO el Norda Afriko.

TRẦN Thị Hoan (Ĝojo)

Proponintaj fakoj: Edukado, Informado, Landa kaj Faka Agado, Rilatoj kun UEA

Kiel Prezidanto kaj eksa Ĝenerala Sekretario, Ĝojo havas tre signifan sperton kaj internan konon de TEJO, kiun ŝi povas disponigi en la rolo de vicprezidanto, cetere bone kompletigante la ecojn kaj la kapablojn de Joop kaj Muniro.

Ŝia persona kaj labora situacio evoluis tiel ke ne plu aktualas la pasintjaraj problemoj kiu malebligis taŭgan agadon. Sekve, konsiderante ke ŝi reprezentas kontinuecon kaj gravan sperton je la servo de la novaj estraranoj, la Elekta Komisiono forte rekomendas elekti ŝin. Aparte rimarkendas ŝia plurmonata sperto kiel volontulo de UEA en la Centra Oficejo kiu donas ege gravan sperton pri la rilatoj kun UEA.

Estraranoj

Por estrarano kandidatiĝas 10 personoj, kaj laŭstatute maksimume 6 povas elektiĝi.

Hamid Babadi AKASHEH

Proponintaj fakoj: Informado, Merkatiko, Projektoj, Rilatoj kun UEA, Volontuloj

La Elekta Komisiono provis kontaktiĝi kun Hamid por intervui lin, samkiel okazis pri ĉiuj aliaj kandidatoj, li tamen ne reagis al la mesaĝoj de la Elekta Komisiono.

Konsiderante lian minimuman aktivadon internacian kaj la gravecon de reta komunikado en la Estrara laboro, la Elekta Komisiono ne rekomendas lian elektiĝon.

Álvaro CHAVES LADINO

Proponintaj fakoj: Edukado, Kulturo, Scienco, Tehnologio, Universitata Agado

Álvaro havas tre signifan sperton en Kolombio, granda entuziasmo kaj, pro ŝanĝoj en labora kaj studa situacio, ekhavas baldaŭ pli da libera tempo por esperanta agado.

Tamen, konsiderante la malabundan internacian sperton, la pli malaltan lingvonivelno kompare al aliaj kandidatoj kaj la kandidatiĝon de pli spertaj aktivuloj en la menciitaj fakoj, la Elekta Komisiono konsilas ke Álvaro plu agadu en aliaj postenoj kaj ne ankoraŭ elekti lin al la Estraro.

JUNG Yuro (Unika)

Proponintaj fakoj: Edukado, Kulturo, Moviĝeblo, Merkatiko, Projektoj, Scienco

Unika aktivas en Esperantujo ek de 2007. En 2010 ŝi translokiĝis al Japanujo kie ŝi daŭrigis sian agadon por Esperanto.

Ŝi estis aktiva en diversaj esperanto-asocioj, inter ili universitata klubo (kiun ŝi rekunfondis), KEJ (kiun ŝi ankaŭ rekunfondis) kaj JEJ (kie ŝi instigis gejunulojn renkontiĝi) kaj ILEI (kies observanto en la TEJO-Estrararo ŝi estas).

Nun Unika loĝas en Hispanujo kie ŝi fondis entreprenon kaj laboras per Esperanto.

La ĉefa fako por kiu ŝi kandidatiĝas estas merkatico, kio plene kongruas kun ŝia sperto stude kaj labore.

Krome ŝi disponeblas por labori pri Edukado, Scienco kaj Kulturo kun pleja prefero por la ĉi-lastaj. Ŝi havas profesionan sperton pri tiuj fakoj kaj, konsiderante la interlingvistikajn studojn, bonan akademian fonon pri edukado kaj kulturo.

La Elekta Komisiono forte rekomendas elekti ŝin kiel estrarano.

Koffitché KOUFIONOU

Proponintaj fakoj: Adoleska Agado, Aktivula Trejnado, Kongresoj, Kulturo, Landa kaj Faka Agado

Koffitché havas longan sperton kiel gvidanto de nia landa sekcio en Togolando kaj aparte li partoprenis la organizadon de la IJK en Togolando.

Kvankam li kandidatiĝis pri aktivula trejnado (pri kio li ne havas signifajn spertojn), li montris ideojn kaj entuziasmon ĉefe pri landa agado en Afriko, pri kio li estas la nura kandidato.

Alia fako en kiu li havas konkretan sperton estas adoleska agado kiel gvidanto de paroĥejaj adoleskaj grupoj.

Aliflanke li ne havas vastan sperton pri internacia agado ekster Togolando. Kaze de neelektiĝo al la estraro, la Elekta Komisiono rekomendas lin kiel komisiito por Landa Agado en Afriko.

Catherine NEILSON (Kejti)

Proponintaj fakoj: Pasporta Servo, Scienco

Kvankam ŝia ĉefa fokuso estas la rolo de Ĝenerala Sekretario, Kejti pretas ankaŭ kandidati kiel estrarano kaj, malgraŭ la limigita sperto, pretus okupiĝi pri preskaŭ ajna fako kun prefero al Pasporta Servo, projekto aparte kara al ŝi, kaj Scienco pro profesia fono.

Ni tamen taksas preferinde la elekton de homoj kiuj jam havas sperton en la diversaj agadoj.

Luis Miguel OBANDO

Proponintaj fakoj: Informado, Juro, Kongresoj, Landa kaj Faka Agado, Merkatico, Pasporta Servo, Rilatoj kun UEA

Luis estas kolombiano nuntempe loĝanta en Usono, sed kiu tre baldaŭ translokiĝos al Paragvajo. En Esperanto-movado, li estas senpostena kontribuanto en Kolombia Esperanto-Ligo kaj prizorgas volontulojn, tradukadon, blogan verkadon kaj kunorganizadon de kongresoj. Li estas reta volontulo de UEA, kie li kunlaboras pri la reta versio de la revuo Esperanto, kaj en TEJO jam estis kunsidestro. Krome, en sia persona vivo, li jam gvidis plurajn entreprenojn. Pro tio ke li povas doni bonajn kontribuojn precipe rilate al Informado kaj Merkatico, la Elekta Komisiono rekomendas lian elektiĝon.

Karina GONÇALVES DE SOUZA DE OLIVEIRA

Proponintaj fakoj: Adoleska Agado, Edukado, Landa kaj Faka Agado, Scienco, Universitata Agado

Karina estas vicprezidanto de BEJO kaj komisiito de TEJO pri Edukado. Karina fondis la grupon pri Universitata agado kaj ŝi estas unu el la teamanoj de la kurso de Esperanto por portugallingvanoj en Duolingo.

Antaŭ tio ŝi dum 4 jaroj estis estrarano de Esperanto Asocio en San-Paŭlo.

Danke al la konkurso PP IJK en 2018 ŝi partortoprenis IJKn en Badajoz kaj tio motivigis ŝin agi tutmonde, antaŭ tio ŝi aktivis por Esperanto pli ol 10 jaroj, sed en ŝia regiono.

Karina havas plurajn signifajn spertojn al la proponitaj fakoj:

Ŝi organizis KER-ekzamenajn sesiojn dum junularaj renkontiĝoj. Eduko kaj Scienco estas ŝia fako laŭ profesio.

Ŝi foje instruis al adoleskoj kaj havas ideojn pri kiel aktivigi adoleskan agadon ĉe TEJO.

Dum lastatempo ŝi akompanis laboron pri revigligo de la agado en Sudameriko kaj nun ŝi estas translokiĝanta al Sud-Koreujo, kie ŝi havos novan laboron.

Alexandre RAYMOND (Alekĉjo)

Proponintaj fakoj: Kongresoj, Landa kaj Faka Agado, Moviĝeblo, Projektoj

Alekĉjo estas jam sperta TEJO-aktivulo, dum pluraj jaroj en la Komitato kaj estrarano de 2013 al 2015.

Lia ĉefa fako estas kongresoj, ja li jam partoprenis la organizadon de pluraj Internaciaj Junularaj Kongresoj kaj de aliaj esperanto-renkontiĝoj, kio faras lin tre taŭga por la posteno. Krome li estas la kreinto de la fako moviĝeblo kaj spertas en organizado de karavanoj al kaj inter Esperanto-eventoj.

Kiel eŭropano loĝanta en Suda Ameriko, li havas konon de nia movado en du kontinentoj kio povus esti utila por okupiĝi pri landa agado.

TRẦN Thị Hoan (Ĝojo)

Proponintaj fakoj: Edukado, Informado, Landa kaj Faka Agado, Rilatoj kun UEA

Kvankam Ĝojo ankaŭ kandidatiĝas kiel simpla estrarano, ŝi pli taŭgas kiel Ĝenerala Sekretario aŭ Vicprezidanto laŭ la Elekta Komisiono.

Alex Vaughn MILLER (Alekso)

Alekso kandidatiĝis post la lasta limdato, pro tio la Elekta Komisiono ne sukcesis detale konsideri lian kandidatiĝon.

Proponitaj teamoj

El la 12 ĝustatempaj kandidatiĝoj eblus fari multajn teamojn, tamen kelkaj konstatoj laŭ ni limigas la elekton:

- Estas nur po unu kandidato por prezidanto kaj kasisto. Rezulte la du kandidatoj Joop kaj Feliĉa aperas en ĉiuj proponitaj teamoj.
- Kiel la nuraj kandidatoj el la antaŭa estraro Feliĉa kaj Ĝojo aperas en ĉiuj proponitaj teamoj.
- Pro siaj unikaj spertoj inter la kandidatoj Alekĉjo (Kongresoj) kaj Mounir (Subvencioj) aperas en ĉiuj proponitaj teamoj.
- La kandidatoj Álvaro kaj Hamid pro la supre menciitaj kialoj laŭ ni pli taŭgas en alia rolo ol en la estraro.

Tamen eĉ kun tiuj konstatoj ankoraŭ eblas multaj teamoj, kiuj ĉi-sube estas listigitaj unue laŭ Ĝenerala Sekretario kaj poste laŭ grandeco.

Sekvas klarigo de mallongigoj:

- AT: Aktivula Trejnado
- ER: Eksteraj Rilatoj
- LA: Landa kaj Faka Agado
- UEA: Rilatoj kun UEA
- Univ: Universitata Agado

En la teamoj, pluraj homoj estas markitaj por UEA ĉar jam dum pluraj jaroj kutime TEJO havas du observantojn ĉe UEA kaj pluraj homoj estas markitaj por Landa Agado ĉar plejparte oni esprimis volon okupiĝi pri Landa Agado en sia(j) kontinento(j).

Teamoj kun Kejti (Catherine NEILSON) kiel Ĝenerala Sekretario:

7-opaj teamoj:

- | | |
|-------------------------------|-------------------------------------|
| • Abel Johannes KIEFTE (Joop) | Prezidanto, AT, Talento, Tehnologio |
| • BÙI Hải Mừng (Feliĉa) | Kasisto |
| • Catherine NEILSON (Kejti) | ĜenSek, Scienco |
| • Mounir ABJIU | Vic-p, ER, Projektoj, Volontuloj |
| • TRẦN Thị Hoan (Ĝojo) | Vic-p, Edukado, Informado, LA, UEA |
| • Alexandre RAYMOND (Alekĉjo) | Moviĝebloj, LA, Kongresoj |
| • Luis Miguel OBANDO | LA, Merkatiko, Pasporta Servo, UEA |

aŭ

- | | |
|-------------------------------|-------------------------------------|
| • Abel Johannes KIEFTE (Joop) | Prezidanto, AT, Talento, Tehnologio |
| • BÙI Hải Mừng (Feliĉa) | Kasisto, UEA |
| • Catherine NEILSON (Kejti) | ĜenSek, Pasporta Servo |
| • Mounir ABJIU | Vic-p, ER, Projektoj, Volontuloj |

- TRẦN Thị Hoan (Ĝojo) Vic-p, Edukado, Informado, LA, UEA
- Alexandre RAYMOND (Alekcjo) Moviĝbloj, LA, Kongresoj
- JUNG Yuro (Unika) Kulturo, Merkatiko, Scienco

9-opaj teamoj:

- Abel Johannes KIEFTE (Joop) Prezidanto, AT, Talento, Teĥnologio
- BÙI Hải Mừng (Feliĉa) Kasisto
- Catherine NEILSON (Kejti) ĜenSek
- Mounir ABJIOU Vic-p, ER, Projektoj, Volontuloj
- TRẦN Thị Hoan (Ĝojo) Vic-p, Edukado, Informado, LA, UEA
- Alexandre RAYMOND (Alekcjo) Moviĝbloj, LA, Kongresoj
- JUNG Yuro (Unika) Kulturo, Merkatiko, Scienco
- Koffitché KOUFIONOU Adoleska Agado, LA
- Luis Miguel OBANDO Juro, LA, Pasporta Servo, UEA

aŭ

- Abel Johannes KIEFTE (Joop) Prezidanto, AT, Talento, Teĥnologio
- BÙI Hải Mừng (Feliĉa) Kasisto
- Catherine NEILSON (Kejti) ĜenSek, Pasporta Servo
- Mounir ABJIOU Vic-p, ER, Projektoj, Volontuloj
- TRẦN Thị Hoan (Ĝojo) Vic-p, Informado, LA, UEA
- Alexandre RAYMOND (Alekcjo) Moviĝbloj, LA, Kongresoj
- JUNG Yuro (Unika) Kulturo, Merkatiko
- Koffitché KOUFIONOU Adoleska Agado, LA
- Karina GONÇALVES DE OLIVEIRA Edukado, Egaleco, LA, Scienco, UEA, Univ.

aŭ // *La Elekta Komisiono tre preferas ĉi tion pro ekvilibra disdivido de taskoj kaj la antaŭvidebla kaj integreca bona kunlaboro ene de la teamo.*

- Abel Johannes KIEFTE (Joop) Prezidanto, AT, Talento, Teĥnologio
- BÙI Hải Mừng (Feliĉa) Kasisto
- Catherine NEILSON (Kejti) ĜenSek
- Mounir ABJIOU Vic-p, ER, Projektoj, Volontuloj
- TRẦN Thị Hoan (Ĝojo) Vic-p, Edukado, LA, UEA
- Alexandre RAYMOND (Alekcjo) Moviĝbloj, LA, Kongresoj
- JUNG Yuro (Unika) Kulturo, Merkatiko, Scienco
- Luis Miguel OBANDO Informado, Juro, Pasporta Servo
- Karina GONÇALVES DE OLIVEIRA Adoleska Agado, Egaleco, LA, UEA, Univ.

Teamoj kun Ĝojo (TRẦN Thị Hoan) kiel Ĝenerala Sekretario:

7-opaj teamoj:

- Abel Johannes KIEFTE (Joop) Prezidanto, AT, Talento, Teĥnologio

- BÙI Hải Mừng (Feliça) Kasisto, LA
- TRẦN Thị Hoan (Ĝojo) ĜenSek, UEA
- Mounir ABJIOU Vic-p, ER, Projektoj, Volontuloj
- Alexandre RAYMOND (Alekĉjo) Moviĝebloj, LA, Kongresoj
- Luis Miguel OBANDO Informado, Juro, LA, Pasporta Servo, UEA
- JUNG Yuro (Unika) Edukado, Egaleco, Kulturo, Merkatiko, Scienco

aŭ

- Abel Johannes KIEFTE (Joop) Prezidanto, AT, Talento, Tehnologio
- BÙI Hải Mừng (Feliça) Kasisto, LA
- TRẦN Thị Hoan (Ĝojo) ĜenSek, UEA
- Mounir ABJIOU Vic-p, ER, Projektoj, Volontuloj
- Alexandre RAYMOND (Alekĉjo) Moviĝebloj, LA, Kongresoj
- Luis Miguel OBANDO Informado, Juro, Merkatiko, Pasporta Servo
- Karina GONÇALVES DE OLIVEIRA Adol., Edukado, Egaleco, LA, Scienco, UEA, Uni

8-opaj teamoj:

- Abel Johannes KIEFTE (Joop) Prezidanto, AT, Talento, Tehnologio
- BÙI Hải Mừng (Feliça) Kasisto, LA
- TRẦN Thị Hoan (Ĝojo) ĜenSek, UEA
- Mounir ABJIOU Vic-p, ER, Projektoj, Volontuloj
- Alexandre RAYMOND (Alekĉjo) Moviĝebloj, LA, Kongresoj
- JUNG Yuro (Unika) Edukado, Merkatiko, Scienco
- Koffitché KOUFIONOU Adoleska Agado, Kulturo, LA
- Luis Miguel OBANDO Informado, Juro, LA, Pasporta Servo, UEA

aŭ

- Abel Johannes KIEFTE (Joop) Prezidanto, AT, Talento, Tehnologio
- BÙI Hải Mừng (Feliça) Kasisto, LA
- TRẦN Thị Hoan (Ĝojo) ĜenSek, UEA
- Mounir ABJIOU Vic-p, ER, Projektoj, Volontuloj
- Alexandre RAYMOND (Alekĉjo) Moviĝebloj, LA, Kongresoj
- JUNG Yuro (Unika) Merkatiko, Kulturo
- Koffitché KOUFIONOU Adoleska Agado, LA
- Karina GONÇALVES DE OLIVEIRA Edukado, Egaleco, LA, Scienco, UEA, Uni

aŭ

- Abel Johannes KIEFTE (Joop) Prezidanto, AT, Talento, Tehnologio
- BÙI Hải Mừng (Feliça) Kasisto, LA
- TRẦN Thị Hoan (Ĝojo) ĜenSek, UEA
- Mounir ABJIOU Vic-p, ER, Projektoj, Volontuloj
- Alexandre RAYMOND (Alekĉjo) Moviĝebloj, LA, Kongresoj

- JUNG Yuro (Unika) Edukado, Merkatiko, Kulturo
- Luis Miguel OBANDO Informado, Juro, LA, Pasporta Servo
- Karina GONÇALVES DE OLIVEIRA Adoleska Agado, Egaleco, Scienco, UEA, Uni

9-opa teamo:

- Abel Johannes KIEFTE (Joop) Prezidanto, AT, Talento, Tehnologio
- BÙI Hải Mừng (Feliĉa) Kasisto, LA
- TRẦN Thị Hoan (Ĝojo) ĜenSek, UEA
- Mounir ABJIOU Vic-p, ER, Projektoj, Volontuloj
- Alexandre RAYMOND (Alekcjo) Moviĝebloj, LA, Kongresoj
- JUNG Yuro (Unika) Merkatiko, Kulturo
- Koffitché KOUFIONOU Adoleska Agado, LA
- Luis Miguel OBANDO Informado, Juro, Pasporta Servo
- Karina GONÇALVES DE OLIVEIRA Egaleco, Edukado, LA, UEA, Uni